

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI


MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
LIPIEC 1927 JULIO

Nr. 7. N-o

WIDOKI NA NAJBLIŻSZĄ PRZYSZŁOŚĆ.

YJEMY w epoce przełomowej i wobec postępów myśli ludzkiej, dla których obszar ziemskiego globu jest już za mały; gdy w ciągu nielicznych godzin przebywać będziemy oceany, a podróż z Paryża do Buenos Aires stanie się łatwą przejażdżką nieledwie poobiednią; muszą upaść granice językowe, dzielące poszczególne ludy i dążność do porozumienia się zapomocą jednego łatwego i prostego języka musi stać się powszechną.

Jeżeli to się dotąd nie stało — zbytnio dziwić się nie należy. Umysł przeciętnego człowieka tak się zżył z warunkami językowymi, jakie dotąd panują, że zmiana ich nie wydaje mu się możliwą: każdy nieobeznany z podstawami Esperanta sądzi przedewszystkiem, że nonsensem jest powiększać liczbę języków już istniejących o jeszcze jeden. Ta myśl staje przedewszystkiem przed każdym dotychczasowym pedagogiem, który nie zadał sobie trudu powierzchownego choćby rozpatrzenia się w zasadach tego naprawdę genialnego wynalazku.

Ale jeżeli porównamy stan obecny umysłów w kierunku samego tylko odczuwania wartości idei esperanta z tym, jaki pamiętamy z przed lat choćby dwudziestu, widzimy, że zaszły duże zmiany. Jeżeli dawniej, każdy prawie z kim zaczęliśmy o esperancie rozmowę wzruszał ramionami i przerywał dyskusję, przyglądając się z pewnem nieraz kłopotliwem zdziwieniem zwolennikowi tego nowatorstwa — dziś często spotykamy się już z potakującym kiwnięciem głową: tak, tak, — esperanto ma przyszłość przed sobą...

Ma przyszłość? Dlaczego nie najbliższą teraźniejszość? Tylko dlatego, że umysł przeciętny niema tej koniecznej życiowej ruchliwości, nie umie głębiej przejąć się ideą konieczności wyjścia z zakłętego koła obcości, w jakiej ciągle pozostajemy. Ruchliwość ekonomiczna, polityczna, przemysłowa rozwinęła się w jednostkach i w zreszeniach. W naszych oczach dokonały się

i dokonywują się w całym świecie przeobrażenia, o jakich przed laty 20 niktby nie śmiał pomyśleć. W jednym tylko kierunku pozostała ciemnota.

Gdy spytamy Anglika lub Amerykanina, przedstawicieli najruchliwszych ludów świata, co myślą o esperancie, odpowiedzą, że im wogóle jest niepotrzebny żaden inny język, prócz angielskiego, z którym oni dają sobie radę prawie na całej kuli ziemskiej, w każdym razie na wszystkich morzach świata. Amerykanin ani Anglik dotychczas nie poczuwa się do potrzeby używania innego języka.

I to jest wielki szkopał w rozpowszechnieniu esperanta. Anglja już zrozumiała częściowo przynajmniej tę potrzebę. Jeżeli mówię o Anglii, mam na myśli przedewszystkiem Szkocję, która swoim zjazdem w Edynburgu dowiodła, że już zaczyna stać na wysokości zrozumienia tego wielkiego zadania. Prawie 800 Anglików i Szkotów tam zgromadzonych, pośród nich wybitni przedstawiciele inteligencji angielskiej, — wszyscy mówią dobrze po esperancku — wprowadzają do domu rodzinnego śpiewy wieczorne i czytania Biblii w tym języku — to już wielka siła. Z Wielkiej Brytanji wpływ ten rozszerzy się na Stany Zjednoczone, które dotychczas stanowią najbogatsze w świecie samowystarczalne państwo: może ono dotąd pozwolić sobie na nieznanomość innych języków, ale nie będzie to trwać długo. Musi nastąpić zwrot, gdy się pokaże, że kapitał amerykański, któremu już u siebie za ciasno, musi szukać lokaty w innych krajach.

Wówczas Amerykanin pogodzi się najprędzej może właśnie z językiem Esperanto, bo to jest język, jak stworzony do „business'u“. A gdzie się to zrozumienie rozpocznie? Niewątpliwie na jednym ze Zjazdów międzynarodowych, które są najlepszym łącznikiem porozumiewawczym.

Zjazd tegoroczny, rozpoczęty w Gdańsku a skończony w Warszawie, będzie — mojem zdaniem — jednym z punktów wytycznych tego przełomu, na którym dziś się znajdujemy po 40 latach od czasu wynalazku języka przez naszego genialnego ziomka Dra Zamenhofa.

Prof. Dr. Odo Bujwid,



PRI INTERNACIAJ KONGRESOJ.

La valoro de internaciaj kongresoj estas tute alia por la ordinare aranĝitaj multlingvaj internaciaj kongresoj — tute diferenca por niaj esperantaj kongresoj.

Sendube unu celon atingas ambaŭ specoj: aproksimiĝon kaj interkonatiĝon. Sed ni komparu unu al la alia. Unua interkonatiĝa vespero. Kunvenas kvar specialistoj, kuracistoj: anglo, franco, germano, polo. Regule la anglo parolas nur anglan lingvon. Kial uzi alian, kiam oni ĝin ne bezonas. Anglo kaj usonano povas interkompreniĝi sen aliaj lingvoj. Al ili apartenas $\frac{1}{4}$ de la terglobo, maroj, oceanoj. Sed en la societo de tri aliaj nacioj anglo aŭ usonano sentas sin fremdulo. Franco ankaŭ ne ofte parolas alian lingvon. Nur germano aŭ polo komprenas unu aŭ du lingvojn. Komencas inter tiuj ĉi kvar personoj interkonatiĝa parolado, kiu baldaŭ finiĝas mimike kun agrabla rideto, komuna trinkado kaj manĝo, kaj la komedio de interkonatiĝo finiĝas. Perfekta interkonatiĝa komuna vespero! Kiom da interkonatiĝoj tiuspecaj mi travivis dum mia 70 jara vivo. Tamen oni estas socia homo, oni deziras socian vivadon, oni penas ekkoni diversajn karakterojn naciajn aŭ lokajn originalaĵojn.

Kiel granda diferenco kompare kun iu ajn kongreso esperanta! Kunvenas 30—40 nacioj. Ĉiuj nacioj alparolas unu la alian sen malfacilaĵo-aŭ, se oni ne havas oftan okazon paroli esperante, oni havas samajn malfacilaĵojn. Mankas al unu parolanto ia esprimo aŭ vorto alia kunparolanto tuj divenas kaj sufloras konvenan vorton. Ambaŭ ĝojas vere, korege, rakontas unu al la alia diversajn travivaĵojn de la vojaĝo, precipe pri la diversa multlingveco kaj tute ridindaj okazoj, kiuj sekvas de malkompreno. Unu francino en Italujo havas soifon kaj ne konas italan vorton. Petegas france-neniu komprenas. Fine esperantisto, kiu okaze troviĝas en la vagono, elparolas magian vorton: akvo. Itala servisto tuj komprenis kaj alportis akvon. Estas ankaŭ pli malagrablaj okazoj, kiam oni havas fiziologian bezonon kaj ne povas nomi lokon. La situacio fariĝas ofte tragedia.

Kelkaj esperantaj kongresoj estas speciale memorindaj. Pasintan jaron, mi, ne parolante angle, vizitis tutan Britlandon dank' al nia Edinburga Kongreso. Por alilandano Britlando estas tute ne ordinara lando kun multaj originalaĵoj, kiujn oni ne renkontas sur la kontinento.

Plej belajn, plej agrablajn momentojn de mia vivo mi elportis el tiu ĉi internacia kongreso en Edinburgo. Oni povis vivadi kun niaj britaj samideanoj tiel feliĉe, ĝoje, amike, ke tiu ĉi lasta kongreso restos por ĉiam en mia memoro. Oni pravas diri, ke tiu kongreso havis sian propran karakteron: amuza instruado. Tute aparta kulturo de Britlando, saĝeco de la politika kunvivado de angloj kun skotlandanoj, kvankam el popola

kantaro oni povas ekvidi, kiom da kruelaj bataloj tiuj ĉi du nacioj travivis inter si antaŭ cent jaroj ĝis hodiaŭa, komuna, pacema laborado; ĉio estas ekzemplo de la agordema, racia vivo je la internaciaj bazoj.

Britaj samideanoj ofte priparolis nian Okan jubilean Kongreson, kiun ni festis en Krakovo en 1912, la lasta de nia kara Majstro-amiko. Oni promesis revidi sin reciproke en Danzigo.

Estu nia XIX. tiel ĝoja, instrua, amika, kiel la lasta Edinburga, kiel estis niaj pasintaj kongresoj, dum kiuj ni laboradis kune por pli feliĉa estonteco de la homaro.

O. Bujwid.



AL EKSTERLANDANO.

Mia frato, ne diru malŝatan vorton pri fremda nacio. Ĉar el tiaj vortoj ŝprucas sango.

Same nin portis patrinoj en sia sino kaj same senmovaj fariĝos iam niaj kadavroj.

Vi karesas vian ridantan infanon kaj ame batas por ĝi via koro. Sed la infano fariĝos granda kaj iros batalon por vivo. Kaj via senprudenta parolo kontraŭ ĝi turnos sian venenon.

Ĉar niaj vortoj estas potenca sorĉilo, el kiu ŝprucas sango aŭ vivo.

Tial instruu respekti la vorton „homo“, ĉar franco aŭ polo, ruso aŭ hebreo — la ido de via korpo homo estas.

Malgranda lia feliĉo, granda sufero, facila pereco. Helpu, ke dum lia mallonga ekzisto aliaj respektu lin, kaj ne malamu.

Mia frato, ne diru malŝatan vorton pri fremda nacio. Ĉar el tiaj vortoj ŝprucas sango.

Jan Kostecki.



ADAM ASNYK.

TRANKVILU KOR'.

*Trankvilu kor'! silentu plor'
Pri viaj perdoj en doloro...
Salutu jen al ruĝ-maten'
De naskiĝanto mondlaboro...*

*Vi benu nun al nova sun'
Al novaj floroj, nova temp',
Al freŝ-esper', al freŝ-ofer',
Al freŝ-juneco kaj printemp'...*

*Al pens' kaj sent' de juna gent'
Salutu vi kun kor' amanta,
Al nova cel' kaj nova bel'
Sur niaj cindroj ekfloranta!*

*Benportu kor' al novdolor'
Kaj de amantoj nova ĝuo
Al spika or', rikolta hor'
Kaj al eterne nova bluo!*

Tradukis Leo Belmont.



R. KWIATKOWSKI.

JAPANAJ UTOJ.

*Kiam iras vi batali,
Venki estu certa,
Tim' ne devas vin surfali
Kiam iras vi batali..*

*Kaj ne devas vangoj pali,
Estu brava, lerta —
Kiam iras vi batali,
Venki estu certa.*

*Malsaĝulon plej kontentas,
Se absurdon diras,
Tiam li feliĉon sentas
Kaj tre multe li kontentas...*

*Ĉar stultec' lin komplimentas
Kaj gaje inspiras —
Malsaĝulo plej kontentas,
Se absurdon diras.*

Tradukis Ilo.



AL POLLANDAJ ESPERANTISTOJ.

Post kiam en la fino de la pasinta jaro la Tutpollanda Konferenco de Esperanto en Kraków decidis eldonadon de tutpollanda neŭtrala esp. organo kaj samtempe la krizo de „Pola Esperantisto“ en Warszawa igis la varsoviajn samideanojn transdoni la eldonadon de „Pola Esp.“ al la esperantistaro de Kraków, nia gazeto ĉiam penadis fariĝi pli bonstata tiel laŭ enhavo kaj „vesto“, kiel en la rilato financa. Nia redakcio tuj, post la apero de la unua n-ro (januara) ĉi-jara ricevis de ĉiuj flankoj de Polujo kaj eĉ el la eksterlando gratulojn kaj abonojn, tiel ke ni kun fiero anoncas, ke la abonantaro de „Pola Esp.“ laŭnombre superis hodiaŭ duoble tiun de la j. 1926.

Ŝajnas do, ke la ekzisto de P. E. estas finance certigita. Bedaŭrinde ne estas tiel. La novarangĝo de la gazeto estigis ne nur plinombriĝon de la abonantaro, sed ankaŭ, kio estas neevitebla, plimultiĝon de la eldonadaj elspezoj. La preskaŭ luksa papero kaj arteca presmaniero, — tiel decas por monata revuo — postulas multe pli ol iu opinias. Nia gazeto tial ankoraŭ baziĝas sur la bonvolaj donacoj de kelkaj subtenantoj. Tio ne devas esti en la estonteco. Tio eĉ ne povas esti. Ĉiuokaze ni ne plu havas esperon ricevi plue subtenojn en sama sumo, kiel ĝis nun. Bedaŭrinde niaj plej fervoraj mecenoj kaj subtenantoj ne estas tiel riĉaj, ke ili povu eterne vivteni la gazeton.

Tial ni alvokas hodiaŭ ĉiujn pollandajn esperantistojn, por kiuj la aperado de almenaŭ unu landa revuo esperantista estas ne indiferentaĵo, sed vera korafero kaj afero de esperantista prestiĝo: de hodiaŭ tuj, senprokraste, volu direkti ĉiujn viajn penojn en via esperantista agado al la unu centra afero en la pollanda esperanta movado: al varbado senlaca por „Pola Esperantisto“, kies ekzisto povas esti ŝancelita.

Nia gazeto aperas la XXI-an jaron. Ĝi estas jam konata kaj rekonata en tuta Polujo kiel la organo de pollandaj esperantistoj. Nun ĝi nepre devas plilarĝiĝi! La nombro de esperantistoj en Polujo evidente ja kreskas!

Ni sendas kun ĉi tiu n-ro al ĉiu abonanto specialan Abonilon: la duonjaraj abonantoj renovigu senprokraste sian abonon por la dua duonjaro, samtempe varbu ĉiuj per la Abonilo almenaŭ unu novan abonanton.

Se ĉiu el ni faros sian devon, estos pruvo, ke nia movado ne estas tiel malantaŭenema, kiel vidigas komparo kun aliaj landoj. Se ĉiu plenumos sian devon, ni povos kun konfido plue labori, plue firmigi nian organizon, la organizon de nia ankoraŭ iom disema landa movado. Estos donita la garantio, ke penvaloras labori, ke la pollanda esperantistaro fidas sin mem kaj sian ideon scias ŝati, komprenas kiel age ĝin sukcesigi kaj venkigi.

Samideanoj! La prestiĝo de Esperanto en Polujo balanciĝas hodiaŭ sur, por multaj nevidebla, sed por la konsciaj inter ni klare vidata-pezilo:

la unu pezteleron apenaŭ ete ŝarĝas la gloro kaj honoro de Esperanto en Polujo, la alian glito kaj falo de Esperanto surpremas alplanke. Ŝarĝu per via ago la teleron de la prestiĝo de Esperanto!

*

*

*

„Pola Esp.“ havas ĉ. 400 abonantojn. En j. 1926 ĝi ne havis pli ol ĉ. 160. Eĉ la hodiaŭa abonombro ne estas sufiĉa. Ni bezonas 700 abonantojn por povi regule aperadi. Donacoj ne povas esti daŭra fonto de enspezoj. Ili eĉ estas maldecaj por serioza organo. Ĉiu abonanto varbu nepre almenaŭ unu novulon. Uzu jam hodiaŭ la almetitan al ĉi tiu numero Abonilon!

La E. K. de P. E. D.

kiel nuntempa Redakcio de „P. E.“.



KORNEL MAKUSZYNSKI.

„FRAZO“

Unu poeto de dia graco kaj de graco de l' panjo, kiu pagis por la preso de la libro, ricevis leteron. Estis en ĝi skribite:

„Sinjoro!

Vi miros certe, ricevinte la plenmanon da tiuj ĉi vortoj silentaj, kiuj ekgenuis en nuna momento antaŭ vi kaj petas — petas kiel nur la infanoj scipovas peti, ke vi aperu ĉe mi nur por tio, ke mi povu ekvidi vin kaj viajn okulojn.

Mi havas ie en la korprofundo angulon, en kiu viaj rimoj sonoras tage kaj nokte kiel arĝentaj, japanaj kampanuloj. Viaj vortoj floras ĉiam printempe, kaj vintre mi per la propra sango ilin varmigas...”

— Oh! la! la! — ekpensis la poeto.

„...Demandu min pri nenio. Mi diros nur, ke mi amas la poetojn kaj la florojn. Ĉu mi vin amas? Tion mi ne diris, sed en ĉi tiu momento mi sentas, ke la vangruĝo min ekkaresis, kvazaŭ karesus mian vangon la subiranta suno...”

— Nu, nu! — ekpensis la poeto.

„...Do vi venos? Vi devas veni. Eble freneza estas tio, kion mi faras, tamen laŭdataj estu la frenezaj. Mia, mia pocto! Mi atendas vin, kiel oni atendas la sunleviĝon...”

Tie ĉi la poeto ordigis la kravaton.

„...Atendas vin mia rideto (rideto estas duono de kiso, diris iu bele!) kaj fasko da krizantemoj, kiuj sopire klinis la kronojn al la pordo kaj atendas kune kun mi...

Vi venos?...“

— *Naturellement!* — ekpensis la poeto tute ĝuste, reglatigis la pantalonon kaj iris.

Kaj la bela sinjorino turmentis dume la kapon pro la formo de l' saluto. Alimaniere oni parolas al la oficiroj kaj alimaniere al la poetoj. Simpla afero.

Kaj ŝajnas, ke ŝi elpensis.

Eniris la poeto, haltis ĉe la pordo kaj kliniĝis salute.

Ŝi ŝajnis legadon, jetis do planken la libron, apogis sin je la fotelo kaj videble konfuziĝis.

Kaj poste diris:

— Bonvolu min pardoni... Mi deziris saluti vin per banala, elpensita frazo... Ekvidinte vin mi ĝin forgesis...

Kaj tiu ĉi antaŭparolo estis ĝuste tia rememorita frazo.

Ĉar la virino estas la plej bona regisoro.

Tradukis Br. Kuhl.



NIA SOMERA LABORKAMPO.

Estas nun somero, ferioj. Junaj homoj kun lernjar-finaj atestoj kaj kun ili la pli aĝaj multnombre disveturis al urbetoj kaj vilaĝoj, al somerrestejoj, kurac - kaj banlokoj.

Jen por ĉiu propagandanto bona ŝanco disvastigi nian lingvon. Nia diligenta kolegaro ja ne mallaboros eĉ dum ferioj, ĉu ne? Kaj la ŝanco estas eksterordinara precipe tie, kie kunvenis homoj el kiel eble plej diversaj kaj malproksimaj landpartoj, el provincaĉoj, foraj urbetoj, „enfalintaj“ loĝlokoj, neniam aŭdintaj ion pri Esperanto.

Ĉu ne perfekta estas la ŝanco inter tiajn homojn kvazaŭ hazarde ĵeti lerte vorteton pri nia verdstela afero?

Sole ke vi ne komencu tre sciencajn prelegojn kaj kursojn. Ĉar ripozemo kaj amuziĝemo ne akcelas tian sisteman agadon, rezultus ja rekta kontraŭefiko. La fundamentan gramatikon de E. vi povas klarigi en unu antaŭvespermanĝo kvazaŭ „serĉe“ aŭ okaze de iu halto dum ekskurso. Sed ne tedu viajn kunulojn per longaj argumentoj, ne senesperigu pro indi-

ferenteco, ne indignu pro mokoĵ. Tiu, kiu ekinteresiĝos, mem petos vin pri detaloj kaj klarigoj kaj hejmeveninte certe ekstudos nian lingvon.

Portu la stelon laŭeble kun la surskribo „Esperanto“, tio plej facile okazigos demandojn, kiujn vi povas trankvile respondi. Ne komencu mem la diskuton! Ankaŭ la gazetoj kaj fremdlandaj poŝtkartoj, kiujn vi ricevadas en nia lingvo, plej facile „provokos“ la scivolon de viaj kunestantoj, kiun vi nun povos „grandanime“ kontentigi.

Kaj faru ĉion sen afekteco, naturmaniere, ne diskonigante esperanton kaj ties servojn kvazaŭ iajn kuriozaĵojn, mirindaĵojn, aŭ supernaturajn aperojn.

Bonegan ekzemplon de tia kuraĉloka propagando donis en ĉi tiu vintra sezono en Zakopane P-o D-o Bujwid. Rezultis kelkaj kursoj. Unu el ili partoprenis 25 personoj el 15 diversaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj en tuta Polujo. En Zakopane ili „infektiĝis“ de nia ideo kaj poste disportis ĝin ĉiu en sian hejmlokon, kien ŝajne neniam alpenetrus nia propagandisto.

En ĉiu kuraĉloko, en ĉiu ripoza restejo, kie niaj pacaj batalantoj pasigas sian ferion, varbigu almenaŭ unu nova samideano, tiam nia lando baldaŭ ricevos novajn laborfortojn, kreiĝos novaj lokaj UEA-delegitoj, plidensiĝos la reto de niaj organizaĵoj, ĝis la tuta lando estos firme kovrita de nia benporta verda stelaro.

Slavo.



ESPERANTISTA MOVADO.

W PRZEDEDNIU GDAŃSKA.

Zaledwie dni kilka dzieli nas od XIX. jubileuszowego Kongresu w Gdańsku. Niewątpliwie szerszy ogół esperancki w Polsce skorzysta z tej sposobności i przyjmie w tym zjeździe należyty udział. Normalne bowiem przeszkody: trudności paszportowe i odległość miejsca tym razem odpadają. Paszportu z Polski do Gdańska nie potrzeba, a droga stosunkowo nie daleka.

Wiadomości o XIX-tym podaliśmy już w numerze lutowym i czerwonym naszego pisma. Dziś chcemy po raz ostatni ująć dotychczasowe przedkongresowe poczynania, podczas-kongresowe prace i rozrywki oraz warunki wyjazdu i pobytu w Gdańsku, a wreszcie wspomnieć o pielgrzymce do Warszawy i Białegostoku.

Zjazd gdański darzą szczególnymi względami zarówno miejscowe naczelne władze, jak i zarządy miast Gdańska i Sopotów, równie Rząd Polski jak i Rzeszy niemieckiej, a w pierwszym rzędzie samo społeczeństwo gdańskie.

Przychylnemu stanowisku władz Wolnego Miasta Gdańska mamy do zawdzięczenia takie zarządzenia jak: wydanie urzędowych pocztówek z esperanckim tekstem (patrz Esp. Pol. Nr. VI.), urządzenie specjalnej, rekla-

mowej dla kongresu pieczętki pocztowej, którą się stempluje wszelkie korespondencje i druki, przez gdańską pocztę przechodzące. Nadto urząd pocztowy, który będzie w czasie kongresu w lokalu zjazdowym czynności pełnił, będzie miał osobną esperancką pieczętkę. Podczas Zjazdu policjanci W. M. Gdańska, znający esperanto, nosić będą na ramieniu opaskę z zieloną gwiazdą. Protektorem kongresu jest Dr. Henryk Sahn, Prezydent Senatu W. M. Gdańska, wielce dla naszego ruchu życzliwy. Dowody tego złożył chociażby przez pismo określone do młodzieży gimnazjalnej, ażeby brała udział w kursach esperanta i służyła potem obcym gościom za przewodników.

Zarząd miasta Gdańska okazał swą życzliwość ruchowi esperanckiemu, udzielając darmo swych sal w Magistracie i Parlamencie na posiedzenia ważniejszych sekcji oraz plenarne UEA, ICK i KR.

Zarząd Sopotów, chcąc uczcić jubileuszowy nasz kongres, nazwał jedną z głównych swych ulic „Esperancką“, nadto plac, którym ona się kończy otrzymał takąż nazwę. Na placu tym odbędzie się uroczyste sadzenie „jubileuszowego dębu“, pod który delegaci z różnych stron świata złożą ziemię ze swoich przywiezioną krajów, jako symbol wszechświatowego rozpoznaćchnienia esperanta i jedności jego zwolenników.

Rząd polski, pragnąc ułatwić obcokrajowcom przejazd do Gdańska przez Polskę, względnie późniejszy pobyt w niej, udzieli wszystkim uczestnikom bezpłatnej wizy.

O zwolnieniu nauczycieli na kongres przez Rząd pruski jużesmy pisali w Nr. VI.

Ponieważ w zjeździe wezmą bardzo liczny udział katolicy, którzy już do Gdańska częściowo nawet zjechali, przeto biskup katolicki W. M. Gdańska Hr. O'Rourke zarządził stałe nabożeństwa katolickie z kazaniem, modlitwami i śpiewami po esperancku. Nabożeństwa, ogłoszone w prasie oraz przez księży w kościołach, odbywają się od 19 czerwca w każdą niedzielę i świętą w auli wielkiego seminarjum nauczycielskiego. Odprawia je ks. A. Ce.

Gdańszczanie oczekują kongresu z niecierpliwością, ucząc się gorliwie esperanta. Na skutek komunikatu Miejscowego Kongresowego o urządzaniu kursów zgłosiła się tak wielka liczba chętnych, iż urządzono trzy kursa w największych salach szkolnych Gdańska każdy dla 110 osób. Później zgłaszających się już nawet nie przyjęto. We wszystkich hotelach przygotowano napisy esperanckie, podobnie i karty potraw po restauracjach.

Praca kongresowa skupiać się będzie na posiedzeniach plenarnych esperanckich instytucji oraz rozlicznych sekcji. Nadto urządzone mają być egzaminy esperanckie i konkurs krasomówczy. W czasie kongresu wybitni uczeni esperancy będą wykładać na Letnim Uniwersytecie. Wystarczy wymienić nazwiska: Prof. Dr. Hazime Asada, prof. Wydziału lekarskiego Uniw. w Nagasaki (Japonja), Prof. Dr. Bujwid, b. dziekan U. J. (Kraków), Prof. Dr. A. Schmidt, dyrektor obserwatorium astronomicznego w Poczdamie (Niemcy) i i. Wykłady dotyczące wszystkich dziedzin wiedzy, ilustrowane będą obrazami świetlnymi i filmami.

Kto się nie będzie chciał zbyt długo przepracowywać, spędzi czas na nader licznie przygotowanych rozrywkach, jak np. wieczór zapoznawczy w ogrodzie kongresowym, wycieczka statkiem do Sopotów, dwa bale opera Ryszarda Wagnera, przedstawienie gimnastyczne i w. in.

A ile to wszystko kosztuje?

Mieszkanie: Mieszkanie (oraz jedzenie, wkładka kongr. i wycieczka do Sopotów) — pierwszorządne 200 franków szwajcarskich, drugorzędne 160 fr. szw., zwykle 125 fr. szw. Samo mieszkanie z obsługą w hotelu od osoby od 5—10 guldenów gdańskich, prywatnie od 3—7 guld. Mieszkanie wspólne (dla kobiet oddzielnie) z trzyrazowym pożywieniem 2.50 guld., bez jedzenia 1'20—1'80 guldenów dziennie.

Jedzenie: Śniadanie od 0.30 do 1.50 guld. Obiady od 0.80—3 guld. Kolacja według karty.

Bilety tramwajowe ma każdy uczestnik zjazdu bezpłatnie.

Bilety okrętowe na wycieczkę do Sopotów 4 guldeny.

Karta kongresowa kosztuje: 25 guldenów, (43.20 zł.), 20 marek niemieckich (42.40 zł.), 1 Ł ang. (43.43 zł.), 25 fr. szw. (43 zł.) lub 5 ϕ USA (44.50 zł.). Najkorzystniej więc jest posłać równowartość 20 marek niemieckich 42.40 zł. na konto P. K. O. Poznań Nr. 202.100, p. Kazimierz Majorkiewicz, Czersk, Pomorze. Studenci Uniwersytetów na skutek starań PED. płacą 20 fr. szwajcarskich.

Tak więc cały pobyt (mieszkanie, jedzenie, karta kongresowa) skromnie kosztuje od zł. 75 nie licząc kolei.

Każdy uczestnik kongresu z Polski musi mieć przy sobie „Dowód osobisty“ lub „Wykaz osobisty“, po który należy się jak najszybciej zgłosić do odpowiedniej władzy. Wydanie dowodu wedle ustawy jest bezpłatne. Ostrzega się, że zwyczajne legitymacje urzędnicze, uczniowskie czy inne tem podobne stanowiąc nie wystarczają. Przy wyrabianiu „Dowodu“ proszę nie zapomnieć podać znajomość języka esperanto.

Jako najwyższą kwotę pieniężną można zabrać z Polski do Gdańska 250 zł. na osobę.

*

*

*

Nowością tegorocznego Zjazdu będzie jego „dwumiejscowość“. Otwarty będzie w Gdańsku, a zamknięty w Warszawie. I tam w stolicy Najjaśniejszej Rzeczypospolitej odda świat cały hołd geniuszowi polskiemu. Należałoby więc społeczeństwu polskiemu jak najliczniejszy w tym obchodzie wzięść udział. Kto zatem nie może pojechać na cały zjazd do Gdańska, niechajże przynajmniej na zamknięcie do Warszawy zjedzie. Kartę zgłoszenia — załączoną do tego numeru P. E. — należy przesłać z pieniędzmi, możliwie szybko, na adres: St. Essigman, Warszawa, Marszałkowska 130 m. 5. W programie jest: 4/VIII. o g. 12¹⁵ odjazd z Gdańska pociągiem pospiesznym do Warszawy. Wieczór o g. 21³⁰ uroczyste przyjęcie przybyłych. Następnego dnia (5/VIII.): o g. 10—12 oddanie czci twórcy esperanta D-rowi Zamenhofowi na jego grobie, od g. 12³⁰—14 złożenie wieńca pod pomnikiem A. Mickiewicza i przemowa, od g. 16—18 uroczyste zamknięcie XIX-go Zjazdu, o g. 18 koncert i wspólna wieczerza w Dolinie Szwajcarskiej. Dnia 6/VIII zwiędzanie Warszawy.

Koszta przyjazdu i pobytu: pociąg pospieszny Gdańsk — Warszawa ceny normalne; kl. I.-65'98 zł., kl. II.-38'92 zł., kl. III.-25'85 zł. Hotel dziennie od 5 zł. Jedzenie dziennie około 3 zł. (0'50 + 1'50 + 1 zł.).

Zniżki kolejowe: Jadąc do Gdańska płaci się pełny bilet. Natomiast w drodze powrotnej kupuje się połowę biletu, a jedzie w klasie wyższej

(np. za pól trzeciej w kl. II., za pól drugiej w kl. I.). Zniżka ta jest ważna na linjach: 1) Gdańsk—Warszawa; 2) z Warszawy do miejsca zamieszkania, względnie granicy polskiej; 3) z Warszawy do Częstochowy, Krakowa, Zakopanego, Lwowa, Borysławia, Wilna i Białegostoku i z powrotem do miejsca zamieszkania lub polskiej granicy.

*

*

*

Z Warszawy wielka ilość uczestników uda się do Białegostoku, aby poznać też miejsce urodzenia Mistrza. Jak donosi Dziennik Białostocki Magistrat Białegostoku funduje kosztem miasta tablicę pamiątkową na domu, gdzie urodził się Dr. Zamenhof oraz poczyni ułatwienia uczestnikom uroczystości.

Należy się spodziewać, że społeczeństwo białostockie dołoży wszelkich starań, aby godnie zareprezentować wobec zagranicznych gości swe miasto, tak wielce dzięki esperantu na świecie znane.

A teraz przyjemnej podróży! Dowidzenia na Zjeździe!

Staw.

P O L L A N D A K R O N I K O .

BIAŁYSTOK. Loka Zamenhofs Esper. S-to post longa interrompo rekomencis sian agadon. Ĝi ricevis de S-anino Mejlach senpagan grandan loĝejon ĉe str. Zamenhofs 14. Dum la lastaj ses semajnoj la S-to faris membreregistradon, starigis regulajn ĉiutagajn deĵorojn, dumonatajn kursojn (6 grupoj kun 80 kursanoj), restarigis legejon kaj la bibliotekon. La S-to akceptis P-on H. Asada, kiu prelegis pri Japanujo (21/V.). La Societo aranĝis ankaŭ du prelegojn de S-oj Ŝapiro kaj Kurjański kaj unu ekskurson.

DĄBROWA GÓRNICZA. Por solenigi la jarfinon de esperantolernado en la Urba Lernejo Vespera oni aranĝis la 29/VI. ekspozicion, dum kiu parolis s-ano Bol. Czechowski pri „Signifo de l' esperanto en lernejoj“. Preleganto komunikis, ke dum tiu ĉi jaro 28 da gelernantoj de U. L. V. ricevis 348 korespondaĵojn — ofte tre seriozajn — el la tuta mondo. Ekspoziciaĵoj, kiel Postkartoj ilustritaj, gazetoj, libroj ktp. estas akiritaj pere de esperanta korespondado. Post prelego deklamacii: lernanto s-o Górecki — „Mi malĝojas Sinjoro“, f-ino Stupowska — „Preĝo sub la verda standardo“ kaj f-ino Wajsbekierówna — „Printempo venis“. Feston finis himno, ludita de s-o H. Kaulich.

KATOWICE. La 11/VI. okazis en la ĉambrego de Grand Restaurant la unua distriktkonferenco de PED. Ĉeestis el Krakovo E. K.-anoj de PED: Dro Dreher kaj S-o Alfus. Reprezentitaj estis ok grupoj. La konferencon malfermis S-o Tichawski, ano de E. K. de PED, salutante la ĉeestantojn. En la distriktestraron estas elektitaj jenaj personoj: Prez. — S-o E. Kołodziej, V-prez — Dro H. Broder, Sekr. — S-o J. Kaleta.

KRAKÓW. Per eraro estis forlasita en la sciigo pri Akademickie Koło Esperantystów (Studenta Esperantista Rondo), ke ties kuratoro estas P-o D-o Witold Wilkosz, direktoro de Matematika Instituto ĉe Jagellona Universitato en Kraków.

LUBLIN. La 22/VI. antaŭ la ekzamena komisiono ĉe loka filio de P. E. A. bonsukcese faris ekzamenon s-oj: Tadeusz Pleskaczyński k. Do-

minik Oleksiuk. Daŭras propagando per afiŝoj kaj desegnaĵoj en speciala vitroŝranko apud ĉefstrato.

SOSNOWIEC. Fondiĝis ĉi-tie Esperanto Delegitaro de Sosnowiec konsistanta de delegitoj de Grupoj UEA. TUR kaj MUL. Tasko de tiu ĉi delegitaro estas zorgo pri: ĝenerala progreso de la lingvo en urbo, prezentado esperantistara, ordigo de la bibliotekoj, informoj pri movado la tutan socion kaj gazetaron, aranĝo de la prelegoj k. t. p.

E. D. S. jam havis kunsidon kaj komencis laboron.

La 19-n VI. okazis en „Lasek Sosnowiecki“ renkonto esperantista de tuta urbo. Prelegis s-ro Bol. Czechowski laŭ temo „Kiel ne forgesi nian lingvon“. La plano de la prelego estis disdonita flugfolio.

En urba lernejo MUL. ekzamenon plenumis 8 gelernantoj. Laŭ subteno de la magistrato unu lernanto veturos al Gdańsk al XIX.

TUR kurson 3 monatan finis 6 gelernantoj.

En ĉiuj ne esperantistaj ekskursoj samideanoj partoprenas, atingante tiamaniere plejbonan rezulton propagandan per kantoj kaj esperantaj laŭtaj paroloj.

WARSZAWA. Polskie Towarzystwo Esperantystów (Pola Esperanto Asocio) transloĝiĝis al str. Żórawia 6. m. 28 (tel. Nr. 21.400), kie estas deĵoroj ĉiutage de 7-a vespere. Estas malfermita ankaŭ legejo kaj biblioteko. Pola Kooperativa Asocio decidis eldoni por la kooperativa internacia kongreso, okazonta en Stockholm, libron, montrantan la nunan staton de la pola kooperativa movado. La libro aperos en franca, germana kaj angla lingvoj. Antaŭ kelkaj tagoj dank' al klopodoj de s-ro Jan Zawada oni decidis aldoni al la libro kvarpaĝan resumon en Esperanto. La resumon preparas jam s-ro Zawada.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Laborregularo por distriktestraroj.

§ 1. Grupoj, havantaj sian sidejon en la sama vojevodada distrikto kaj reprezentataj en P. E. D. de almenaŭ 5 delegitoj elektas distriktestraron, konsistantan el prezidanto, viceprezidanto kaj sekretario.

Vojevodaj distriktoj kun malpli ol kvin delegitoj aliĝas al unu el la najbaraj distriktoj. Tiamaniere kunfandiĝintaj distriktoj elektas unu komunan estraron.

§ 2. Aktive balotrajtigataj estas delegitoj de P. E. D. elektitaj en la koncerna distrikto.

Elekteblaj al la distriktestraro estas ankaŭ nedelegitaj esperantistoj. Nur la prezidanto de la estraro devas aparteni al la Delegitaro.

Balotoj por la distriktestraro okazas ĉiun duan jaron.

§ 3. La prezidanto de distriktestraro reprezentas P. E. D. en sia distrikto kaj apartenas al Plena Komitato de P. E. D.

§ 4. Tasko de la distriktestraro estas zorgi, ke la decidoj voĉdonitaj ĉe konferencoj de P. E. D. kaj ĉe kunsidoj de Plena Komitato kaj de Ekzekutiva Komitato estu efektivigitaj en la distrikto.

La unuopaj grupoj interrilatiĝas kun la Ekzekutiva Komitato nur pere de la distriktestraro, kies devo estas prezentadi al la Ekzekutiva Komitato almenaŭ kvaronjare raporton pri sia agado.

§ 5. La prezidanto de la distriktestraro kunvokas almenaŭ dufoje en la jaro distriktan konferencon en kiu partoprenas ĉiuj delegitoj el la koncerna distrikto.

La distrikta Konferenco decidas per simpla plimulto de la voĉoj.

La konferencojn povas ĉeesti ankaŭ nedelegitaj esperantistoj, sed ili ne rajtas partopreni en la diskutoj, fari proponojn aŭ voĉdoni.

La prezidanto de la distriktestraro devas komuniki al la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. la daton kaj tagordon de ĉiu distrikta konferenco almenaŭ 10 tagojn antaŭe. La distriktan konferencon prezidas la distriktestro.

Decidoj voĉdonitaj ĉe distriktaj konferencoj kaj ĉe kunsidoj de distriktestraroj bezonas por sia valideco aprobon de la Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

Se la Ekzekutiva Komitato rifuzas sian aprobon, la distriktestraro povas apelacii al la Plena Komitato de P. E. D.

§ 6. La ordinarajn elspezojn de la distriktestraro kovras la koncernaj grupoj. Tiucele enspezas la distriktestraro jaran kotizon, kiun fiksas la distrikta Konferenco. Ĉi-tiu kotizo ne povas superi duonon de la kotizo fiksita de la Konferenco de P. E. D. por elspezoj de la Ekzekutiva Komitato.

Ekskurso tra Polujo. Kongresanoj dezirantaj partopreni ekskurson tra Polujo bonvolu inskribiĝi ĉe s-o delegito el Kraków, kiu oficos en Danzig dum unuaj du tagoj (28—29/VII.) de la XIX. Kongreso.

Scienca ekskurso post la Kongreso. Laŭ informo en N-o 7 de „Bulteno de la Sc. As. Esp.“ estas aranĝota scienca ekskurso, kiu vizitos vidindaĵojn de Danzig, Warszawa, Wilanów, Kraków, Wieliczka (salminejo), Chorzów (azotajfabriko), Królewska Huta (karbominejoj kaj ferfondejoj), Zakopane, Tatry, Pieniny kaj multaj aliaj.

P. E. D. kunveno dum la XIX. La anoj de P. E. D. kunvenos dum la XIX. kun s-o A. Ĉe, sekr. de I. C. K., por preparoli lian propagandan vojaĝon tra Polujo en oktobro de k. j.

Tutpollanda konferenco de P. E. D., kiu estis okazonta antaŭ la XIX. estas prokrastita ĝis aŭtuno de k. j. La detaloj estos konigitaj en sia tempo.

Aliĝoj al P. E. D. Al P. E. D. aliĝis ankoraŭ tri grupoj: 1) el Białystok-Zamenhofa Esp.-Societo; 2) el Dąbrowa Górnicza — Esp.-Societo „Tagiĝo“; 3) el Sosnowiec — UEA-grupo. En tute aliĝis 17 grupoj kaj societoj. Samtempe ni korektas la eraron, ke Akademia Es.-Rondo ĉe Juda Hejmo en Warszawa ne aliĝis.

Statistiko de pollanda esperantistaro. En „Gvidlibro tra Pollando“ ni publikigis nomojn kaj adresojn de diversaj esperantaj grupoj kaj societoj en Polujo. La E. K. de P. E. D. scias certe, ke tiu ĉi listo estas nek kompleta nek senerara. Pro tio ni insiste petas ĉiujn gesamideanojn bonvolu skribi al P. E. D. (Smoleńska 9) pri ĉiuj esperantaj organizoj ne menciitaj en la Gvidlibro aŭ publikigitaj erare.

Ankaŭ ĉiuj UEA-TEAJ-k. a. delegitoj en Polujo, kiuj ne estas anoncitaj, bonvolu tion al ni komuniki. Afero tre grava por nia movado!

Hołd Juljuszowi Słowackiemu. Dołączając się do hołdu, składanego genjuszowi polskiemu — Juljuszowi Słowackiemu, Ogólnopolska Esperancka Delegacja (P. E. D.) brała udział w uroczystym pochodzie złożenia zwłok Juljusza Słowackiego na Wawelu. Zarazem P. E. D. złożyła 50 zł. na fundusz sprowadzenia zwłok Słowackiego.

Atentu Gekongresanoj! Tre vizitinda estas pola marbordo kun porto Gdynia. Plej bone oni povas veturi per vaporŝipo „Gdańsk“, iranta ĉiutage matene je la 9^h-10 h. de la Motława (Motlau-Danzig) ĝis duoninsulo Hel. Ŝipoj polaj staras post la germanaj ĉe la bordo de Motlau. Pola marbordo estas tre malkara. Ekz. tagmanĝo sursipe kostas 2^h50 zloti (=1^h45 guldenoj).



B I B L I O G R A F I O.

Gvidlibro tra Pollando kaj Libera Urbo Danzig (Gdańsk). Kraków, 1927. Prezo 1^h50 zł. Aĉetebla ĉe „Pola Esperantisto“. 120 paĝoj kun multaj ilustraĵoj.

En la lastaj tempoj eldonado de gvidfolioj kaj gvidlibroj fariĝas tre grandnombra en ĉiuj landoj. Tio estas unu el plej gravaj praktikaj servoj de l' esperanto. En Polujo ni havis ĝis nun gvidlibroj tra: Kraków, Tatry, Zakopane kaj Bochnia (ĉiuj elĉerpitaj). Nune tiun ĉi nedezireblan mankon forŝovas eldonita okaze de la XIX. „Gvidlibro tra Pollando“ dank' al klopedoj de P. E. D. En la redaktado kunlaboris multaj fakuloj, tiugradaj kiel P-o P-to T. Kruszyński. Teksto kun ilustraĵoj prezentas sin tre bone kaj estas — mirabile dictu — senerara. Mankas nur landkarto, necesega por ĉiu gvidlibro, kion oni certe ankoraŭ plenigos. Generale laŭdinda kaj legenda libro.

Slavo.



DE LA REDAKCIO.

Nia ŝatata samideano B. Kuhl, Redaktoro de P. E., forveturis liberetmon. Dume anstataŭas lin Redakcia Komitato konsistanta el E. K.-anoj de P. E. D.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de P. E. pagis jam:

P-o D-o Bujwid por VI. — 30 zł., por VII. — 30 zł.. S-ino Neuberg por V. — 10 zł.; S-o Pęksa por VI. — 10 zł., por VII. — 10 zł.; D-o Róbin, por V. — 20 zł., por VI. — 20 zł.; D-o Rosenstock por V. — 10 zł. por VI. — 10 zł.; S-o Żbikowski — 5 zł.

II. GARANTIA ĆENO DE »POLA ESPERANTISTO«.

1 S-o Mieczysław Piotrowski pagas 10 zł. kaj alvokas s-ojn: Doboszyński, J. Kriss kaj Ing. Tor, dir. de Industria Muzeo.

2. S-o A. Wajcman pagante 2 zł. alvokas s-ojn: Niedbał Juljan (Sosnowiec); Pec Franciszek k. Fisz A. (Dąbrowa G.); Bagiński Wł., Durnaś Jan k. Lipszyc Józef (Olkusz); Kocek Jan (W. Hajduki).

3. S-o Ignacy Wiesenberger pagas 3 zł. kaj alvokas: D-on Janusz Rauch (Boryslaw) k. Gaetano Facchi (Brescia, Italujo).

4. F-ino Falek pagante 2 zł. alvokas: s-inon Mazaraki kaj f-inojn — Fryda Landau k. Mala Silberstein.

5. S-oj A. M. Rozen kaj Glikosztajn pagas 2 zł. kaj alvokas s-ojn: Kozłowski, I. Sercarz k. H. Szpigler (Będzin); I. Tatarka (Strzemieszyce); Kraśniecki (Ząbkowice); Deresz (Łódź); A. Fisz (Dąbrowa G.).

6. P-to Adam Furmanik pagas 5 zł.

7. S-o Hillel Oberländer pagas 3 zł.

8. F-ino Regina Fischel pagas 10 zł.

9. S-o Izaak Zafrański pagas 2 zł.

10. P-ino Waldmannówna pagas 2 zł.

11. S-o Monarszyński pagas 2 zł.

12. F-ino Malinowicer pagas 2 zł.

13. S-o Franz Faruga pagante 2'20 zł. alvokas pagi ĉiujn kiuj en tiu jaro jubileas sian naskiĝtagon

!!VIVU SEKVONTOJ!!

III. LA VENANTA NUMERO DE „POLA ESPERANTISTO“ estas dediĉata al XIX. Kongreso kaj aliaj Jubileo-okazontajoj. Ĝi aperos la 15/IX en duobla amplekso (32 paĝe). Ni sendos ĝin nur al la renovigontaj abonon de P. E.



Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9